

LA NACIA FESTO DE ESPERANTISTOJ: LA 26-A DE JULIO ĈIUJARE

Ĉiu lando havas sian nacian feston. Kutime temas pri la dato en kiu okazis grava evento por la nacia komunumo: akcepto de la baza leĝo/konstitucio, venko en milito, fino de milito [kiun oni malvenkis], naskiĝo de la reĝo, forigo de la reĝo kaj starigo de respubliko, ktp.

Oni ankoraŭ debatas, ĉu esperantistoj estas popolo, komunumo, grupo aŭ io alia, sed certe ili estas socia grupo kun malklaraj limoj, kiu iras de ĵusaj komencantoj al veteranoj kaj ankaŭ ili havas siajn festojn. Lastatempe apud la pli konata, almenaŭ en Eŭropo, la Zamenhof-tago de la 15-a de decembro, komencas aperi nova kvazaŭnacia festo, la 26-a de julio.

Se mi estas verkanta ĉi tiujn liniojn kaj vi estas leganta ilin, tio ŝuldiĝas al la 26-a de julio. Sen ĝi ni ne estus parto de la Esperanto-movado/komunumo/civito/grupo/klubo/asocio [elektu laŭplaĉe]. Kio okazis la 26-an de julio 1887? Io relative banala kaj apenaŭ atentata de la tiama mondo. Aperis en Varsovio libreto kun la titolo en la rusa lingvo: „Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ“, alivorte: Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Do, la tiel nomata "unua libro de Esperanto", kiu poste aperis en aliaj lingvoj. Por havi ideon pri tio, kion la mondo atentis anstataŭ atenti libreton aperintan en Varsovio: en Britujo en tiuj tagoj oni estis festanta la oran jubileon pro 50 jaroj da regado de la reĝino Viktoria kaj ĝuste antaŭ kelkaj tagoj Zulu-lando estis iĝinta parto de la brita imperio.

Sed tiu libreto havis efikon, kiu postvivis la finon de la brita imperio kaj naskis serion da eventoj, kiuj kreis monvastan komunumon de Ĉinujo al Londono kaj de Aŭstralio al la Baltaj landoj por ne paroli pri Mongolujo kaj Ameriko.

Do, tiu mondvasta komunumo rajtas festi la daton de sia apero, la 26-an de julio, kaj post jaroj da provoj nun fine Universala Esperanto-Asocio decidis voki la esperantistojn por festi ĝin laŭ du planoj. Unuflanke esperantistoj simple konduki kiel kondukas ĉiuj aliaj homoj, kiuj festas similajn festojn. Ili festu per kunvenoj, ceremonioj, festaj manĝoj, ekskursoj, donacoj, bondezirado, gazetaraj konferencoj, kaj ĉiu alia agado konvena laŭ la lando kaj la lokaj sociaj moroj.

Oni ankaŭ profitu la okazon por informi neesperantistojn pri nia ekzisto kaj pri la kialoj de nia ekzisto. Kaj en mondo ĉiam pli militema kaj ĉiuokaze firme intencita detruiri sin mem pro troa ekspluatado de la planedo, la afiŝo pretigita de la oficejo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj ŝajnas al mi tre taŭga por priskribi nin kaj nian ekzistojn: *[afiŝo sendita aparte]*

La dua plano de la festado estas internacia kunordigita agado por atingi la deklaron de la Monda Tago de Esperanto [26-a de julio] fare de Unesko, kio estas tre malfacila, ĉar tiajn deklarojn faras la Ĝenerala Asembleo de Unesko, en kiu decidis la reprezentantoj de ĉiuj membro-ŝtatoj. Do, esence almenaŭ unu ŝtato devas proponi tion kaj la aliaj devas voĉdoni por ĝi. Unesko de tempo al tempo deklaris tiajn tagojn, laste pri la afrika lingvo suahila [kiu tamen jam ricevis similan agnoskon de UN] kaj estas lingvo vaste parolata en Afriko.

Ne estas facile antaŭvidi kiom da tempo la tuta monda Esperanto-movado bezonos por trovi la bezonatan subtenon de kelkaj ŝtatoj, sed la provo estos potenca okazo por informi pri Esperanto la naciajn Unesko-komisionojn, la ministeriojn pri eksteraj rilatoj, la ĵurnalistojn kaj do entute meti la movadon pli en la publikan vivon de la landoj.

Sed ni esperas kiel esperantistoj.

Renato Corsetti, Francois Lojacom, Humphrey Tonkin
Uea: la labor-grupo pri la Esperanto-Tago